„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria** „Kuraĝe antaŭen!“

Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Jarabono (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en partpagoj (1/2 j. ŝ 2.35, 1/4 j. ŝ 1.20), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Redakcio kaj administracio: Wien I. Neue Burg (Tel. R27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 6 (121 en la vico). Wien, la 5. de junio 1935. 12. jaro

„Dekdu poetoj“, poemlibro, eld. de „Literatura Mondo“, Budapest.

La prezentitaj poetoj estas: H. Adamson (estono), Hilda Dresen (estonino), B. Price-Heywood (anglo), N. Hovorka (aŭstriano) N. Kurzens (latvo), G. E. Mauro (hispano), L. N. Newell (anglo) Amalia Nunez-Dubus (hispanino) A. Schauhuber (aŭstro*), E. C. Stillman (usonano), F. Szilágyi kaj L. Totsche (hungaroj).

La libron redaktis kaj skribis antaŭparolen kun kelkaj karakterizaj notoj pri ĉiu aŭtoro nia fame konata parnasa gvidanto K. Kalocsay, kiu ja plej eminentas pri tio. Sekve mi vere ne kapablas recenzi la libron, sed povas nur humile citi kelkajn tekstopartojn, kiuj emigu al legoĝuo de la libro:

El la antaŭparolo: La evoluo de la E-literaturo progresas simile al la naciaj lingvoj. Antaŭiras la liriko — jen ĝi jam floras plene. Postsekve, iom ankoraŭ stumble, marŝas la prozo: noveloj, romanoj. Kaj la dramo? Ĝi estas muziko de l' estonto.

Ni ĝoju pri la ekfloro de l' liriko tiom pli, ĉar nia lingvo ege ĝin bezonas. Veraj poetoj povas ĝin vivigi, disvolvi ĝian ekzistantan riĉon novan, plifortigi ĝian naturecon sonorecon, ĉarmon, esprimpovon.

Tiujn asertojn efektive pruvas la poemoj. Jen kelkaj provoj, kion kapablas esprimi la artefarita lingvo, jam ne juna helpa lingvo, sed matura kaj memviva:

Kantas gajon:

Gril', gril', vi gajamuza gril',
kun dolĉa tril'
dum nokt-trankvil'
kaj hel, kaj bel': de sur ĉiel', bril'
de stelmil'.
Tili', lili' kaj papili'
ravigas de la idili', de bril', de tril',
de gril'.

Kantas melankolion:

Flamet' sur modesta meĉo kaŭras,
trembl'as malsanete kaj maldaŭras.
Ridind' ombro mia sin distiris.
la kap' en la manojn jus foriris.

Kantas korsopiron:

En florokalikojn la larmoj
El miaj okuloj gutis.
Mi ĉerpis la florojn kaj ilin
Sur vian kusenon ŝutis.

La nokto baldaŭ alpaŝos,
Vi dormos sur ĉasta kuseno,
Sed mian sopiron malkaŝos
La floroj el mia ĝardeno.

Kantas amon:

Mia kor'
estas for,
for de mi
ĝin perfortis
kaj forportis
unu . . . ŝi . . .

Kantas vivovolon:

Mi volas vivi,
ne senvole dormi;
ne per, sed por mi
estu la viv'.

Se l' vivoĝojo
ne volas mem veni,
ĝin preni, kuntreni —
ha, kia ĝoj'!

Kantas vivenigmon:

Atendi ion
(morgaŭon? majon? morton?)
aŭtune, kiam
la vento elpelegas
foliojn en la korton . . .

*

Intence mi ne indikis la aŭtorojn de la cititaj poeziaĵoj. Mi ne volis mencidistingi tiun aŭ tiun ĉi. Ĉiuj estas egale legindaj. Tamen la neaŭstriaj legantoj permesu al ni la fieretan rimarkon, ke inter la dekdu poetoj estas du aŭstriaj, pri kies kvalitoj ni ne timas la juĝon de la legantoj.

Ĝojigu tiuj novaj floroj de l' poezio, la plej nobla formo de la lingvo, kiel eble plej multajn Esperantujanojn!

E. W.

*) Ĉu intence ne „aŭstriano“ kiel Hovorka?

Adreso: Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano

Kongreskotizo: Nur ĝis fino de junio Liroj 90 (fam. 54, jun. 36), kaj poste L 100 (60, 40).

Vojaĝo tra Italujo: L 498.—.

Krozado al Alfriko: de L 355.— ĝis 730.— Vidu n-ron 5 de nia gazeto!

La kongresa krozado okazos per alia pli granda ŝipo „Sinaia“. La ŝipo estos plene sub Esperanto-flago. Ne nur simpla, ordinara postkongresa ekskurso, sed parto de la kongreso mem estos la Krozado. Jam pli ol 350 anoncis sin al ĝi. Rapidu, por trovi ankoraŭ lokon! Estos unika okazo, viziti Afrikon!

Sidejo de la 27. estos Roma Universitato.

Aŭstrianoj anoncu vin multnombre! Int. E.-Muzeo peros viajn aliĝojn al Milano al la Komitato.

Anoncu vin ankaŭ al la Antaŭkongresoj en Klagenfurt aŭ Innsbruck!

Informojn kontraŭ respondafranko: Intern. Esp.-Muzeo, Wien, I, Neue Burg.

Ĉiu aŭstria esperantisto estu membro de Aŭstria Esperanto-Asocio, **Wien I. Neue Burg**
Jarkotizo S 2.— (senlaboruloj kaj familianoj S 1.—)

D-ro Anton Eltschkner.

La alt-vicprez. de Ligo de Katolikaj E-istoj en ČSR, lia ekscelenco Ĥefepiskopo de Praha d-ro A. Eltschkner honora membro de Int. E-Muzeo en Wien, lesis en maĵo de jubileojn:

30-jaran pastran jubileon kaj

10-jaran prezidantecon de Klubo de Kat. esp-istoj en Praha.

Elkore ni gratulas al nia Esperanto-episkopo kaj bonvolis ankaŭ porekstere montri sian emon al E., metante la E.-insignon en sian episkopan blazonon.

Registaro
de Princlando Liechtenstein

N-ro 153-31 Vaduz, la 17. de majo 1935.

Lia Princa Moŝto la Suvereno plej favore volis distingi vin en taksado de viaj meritoj pro la fremdultrafiko en Liechtenstein per „Princa Jubilea Memor-medalo de Lihtenstejno".

Informante vin pri ĉi tiu plej alta distingo, mi uzas samtempe la okazon, gratuli vin plej kore al ĉi tiu altgrada honorigo.

La medalo kaj la koncerna statutaro estas aldonitaj. Mi petas, atesti la ricevon.

Kun la certigo de mia plej granda altestimo

D-ro Hoop
princa Registar-ĉefo

Al s-ro registara konsil. Hugo Steiner, Wien.

(Traduko laŭ la germana teksto)

Oficiala Honorigo al Direktoro de UEA.

Lia Moŝto, Francisko I-a, la Reganta Princo de Liechtenstein, jus nomis s-ron Rob. Kreuz, Direktoro de UEA, en Genève, „Princa Komerca Konsilisto", konsiderante liajn meritojn pri la fremdul-trafiko en tiu ĉi princlando. De pluraj jaroj la Direktoro de UEA okupiĝas pri la turisma propagando de Liechtenstein pere de Esperanto. Li ankaŭ reprezentis la Registaron kiel Speciala Komisaro en niaj universalaj kaj aliaj kongresoj neesperantistaj. Al lia iniciato estas ŝuldataj la ĝis nun aperintaj 2 serioj de oficialaj poŝtkartoj en Esperanto kaj pluraj prospektoj pri la lando. Pro tio, tiu ĉi gratulinda honorigo estas samtempe rekono por la Esperantomovado kaj pri la efikeco de Esperanto mem kiel moderna helpilo por la turismo. Ĝi estas krome indikilo, kun kiu direkto ni devas orientadi niajn praktikan laboron.

Junio.

(El „Ama Kalendaro" de Wachauer Vagantenbrevier de V. O. Ludwig. Reinhold-Verlag.)

Gaje saltas la geknaboj
Super fajrojn pro Sundio
Arde ruĝe nun la korpojn
Pentras flamoj de pasio.

Se foriĝis la fajreroj
Post la fin' de l' brulofero,
Kelkajn truojn pantalonajn
Kaŭzis festo de l' somero.

Difavor', se pantalon' nur
Pro la ardo brulsuferis
Kaj pro sagoj de la Amo
Ne la koro malesperis.

Trad. d-ro Biehler-Graz

Esperanto en la Elektrotekniko.

Depost kelka tempo la internaciaj organizaĵoj de elektrotekniko kaj de normigo okupiĝas pri E. Jen la faktoj:

1909—22. La konataj elektro-inĝenieroj Dejean (1909), Maillaux (1912), Jonaust (1913), Herrmann (1917), Leblanc (1920), Janet (1921), Klingenberg (1922) rekomendas E. por uzo en la elektriko kaj en Internacia Elektra Komisiono (CEI).

1927. Arakawa-Bunroku en Kioto proponas la normigon de E.-vortoj por eletraj konceptaĵoj kaj ilian uzon kiel gastvortojn en la japana lingvo, simile al la latinaj planto-nomoj. La Plenkunsido de Intern. Unio de Radiofonio rekomendas al la membroj disaŭdigi en E unu fojon semajne kaj unufoje tage anonci la staciojn en tiu ĉi lingvo.

1931. Intern. Konsila Komitato por telefonio longdistanca (CCI) akceptas, laŭ angla propono, la E.-alfabeton por siaj logatomoj (kontrol-silaboj). La japanoj Ikari kaj Seki proponas en "Journal of the Illum, Eng. Society, Tokio" al Intern. Komisiono de lumigotekniko (CIE) la uzon de E. kiel konferenc-lingvon. La organo „Ohni"-Tokio enkondukas E.-rubrikon. Unuiĝo de germanaj inĝenieroj (VDI) en Berlin kun financa subteno de „Prusa Akademio de l'Konstruarto" eldonis ampleksan fonto-verkon pri „Intern. Lingvonormigo en la elektrotekniko" (de d-ro inĝ. Wüster), kiu rekomendas E.-on.

1932. Intern. Kongreso de Elektro en Paris (Sekcio 2) traktadas pri E. (Raporto vol. 2).

1933. En komuna letero al Intern. Elektroteknika Komisiono (CEI) 31 gvidantaj inĝenieroj el Aŭstrio, Francujo, Germanujo, Hispanujo kaj Nederlando subtenas E.-on.

„Bulteno de la francaj elektroteknikistoj" Paris enkondukas E.-resumojn.

1934. Junio: La vortara komisiono de Internacia Komisiono de Elektro (CEI) decidis aldoni al la 1-a eldono de CIE-vortaro seplementon en E. — Septembro: La konferenco de la sekretarioj de Intern. Federacio de l'Normigo-komitatoj (ISA) traktadas pri la ellaboro de teknikaj-sciencaj kodoj laŭ principoj de E. — Novembro: La sovetlanda normiga komitato decidas (laŭ propono de la aŭstria komitato) estonte aldoni al la normfolioj pri mezuroj subtitolojn en E.

Nov.-dec.: La sovetlanda normigkomitato aperigas subtitolojn en E. sur la normfolioj pri mezuro de longo, unuoj de Radiometrio, Roentgen-radado kaj rentgenometrio.

(Laŭ Esperanto-Genève)

Informetoj.

Internacia Polica Ligo. Kortega konsilisto d-ro Karel Klečka fariĝis landa delegito por Aŭstrio.

Nederlanda Hindujo: Nova E.-gazeto „La Sperto" ekaperis de jan. Jarabono sv. fr. 5.— Adr.: Mamasah Larianbangi, Makassar, Ned Hindujo.

La **XXII-a Bulgara E-Kongreso** okazos Pentekoste en Varna. Pro tiu okazo la bulgaroj dissendis belan faldprospekton pri Varna, la bela urbo kaj moderna marbanejo. Mendu ĉe Oficejo por somerrestado en la Komunumo en Varna, Bulgarujo.

„La lando de Rembrandt, belega faldprospekto kun multaj bildoj kaj landkarto. Eld. de Federacio de Nederlandaj Unuiĝoj por interrilato kun fremduloj, Lange Voorhout 102, Den Haag.

Esp. ĉe gimnastikaj festoj. Ĉe festo, aranĝota en julio de ĉeĥa kaj germana laboristaj gimnast. ligoj en Cheb-Eger, unuafoje kunvenos la ĉeĥaj kaj germanaj laboristaj esp.-istoj.

Argentina Esperanto-Kolegio. La 21. de sept. 1934 fondiĝis en Buenos Aires „Argentina E.-Kolegio", kies ĉefa celo estas, krom la instruado de E., la unua sukcesplena kurso trimonata.

La direktoroj de AEK estas Eugenio Iglesias, membro de IEMW., kaj d-ro Miguel H. Catalano.

Revuoj „Ciencia Popular" kaj „Radio Técnica", Buenos Aires, kaj Esperanto. La grava revuo „Ciencia Popular" publikigadas konstantan E.-rubrikon kaj tutan E.-kurson, kiun nia pioniro Eglesias redaktas. La revuo publikigis bildojn de IEMW kun longa koncerna artikolo. — Same la grava „Radio Técnica" presigis notetojn pri E. — Koran gratulon.

Lasta minuto por aliĝo al la 27. Universala Kongreso Firenze-Napoli kaj Napoli-Tripoli-Genova (3.– 10.– 18. aŭgusto 1935. Neniam plu vi havos tiun unikan okazon!

Arto kaj kulturo en Bruckner-lando Oberösterreich kaj Bruckner-memoro.

Disponigita de la Oficejo por fremdultrafiko, Linz.

„Sur la tero estas de l' famuloj sorto,
ke ni ŝatas lin nur post morto."

Citajo de Schopenhauer, tradukita de Stengel

Bruckner estas por la aŭstrianoj kaj speciale por siaj samlandanoj heredaĵo, kultur-posedaĵo. La iam nomita „lando okcidente de Enns-rivero" prezentas al ĉiu amiko de arto kaj naturo valorajn trezorojn, eĉ tre multspecajn. La geologo, astronomo, muzikon- kaj historion-amantoj kaj la kulturantoj de aliaj artoj kaj sciencoj havas la eblecon fari studojn kaj esploradojn siafakajn en ĉi tiu lando. Eĉ se mi nur dezirus paroli pri muziko en la kadro de mia hodiaŭa prelego la tempo ne sufiĉus. Pro tio mi nur parolas pri la muzika landa patrono Anton Bruckner.

Malmultaj eĉ inter la muzikistoj siatempe komprenis liajn individuecon, eminentecon, pozicion tuj apud Beethoven. Je tio ankaŭ kulpis lia apartigo de la socio kaj lia profundiĝo en sin mem; parte ankaŭ lia firma kredo je Dio, lia neintencita implikiĝo en la partianaron de Wagner, pro kio la sekvantaro de Brahms koleris pri li.

La dornoplena vojo de lia kariero estu nun mallonge skizata, speciale liaj individueco kaj perfektiĝo ĝis Golgatha Wien. Nur unu irhoron de Linz situas Ansfelden, kaŝita inter herbejoj kaj arbarmontejoj. Tie ĉi Anton Bruckner naskiĝis kiel filo de instruisto la 4. sept. 1824. Jam fruaĝe la malgrandulo montris sian inklinon al muziko kaj liaj patro kaj kuzo Weiss donis al li la unuan muzikinstruadon. Lia akcepto kiel ĥorknabo en la abatejo St. Florian estis feliĉo por li, unu el la malmultaj bonŝancoj en lia vivo. La impona barokkonstruaĵo kun siaj trivicaj longaj fenestrofasadoj kaj altegaj preĝejturoj ege impresas la vizitanton. — (St. Florian estas atingebla de Linz post unuhora veturado per tramo aŭ donhora per aŭtomobilo.) — La interno de la preĝejo montras riĉajn stukaĵojn kaj freskopentraĵojn. Vidindaj estas la predika pupitro el nigra marmoro, la ĥorseĝaro, la granda ferkrada pordego kaj la orgengalerio. Sub la Bruckner-orgeno, unu el la plej bonaj kaj grandaj en Aŭstrio, estas la sarkofago de la majstro. Supren la ŝtuparon de la abatejo oni atingas la 175 m longan imperiestran koridoron, de kiu oni eniras la ege pompajn kaj valorajn imperiestrajn ĉambrojn. Belegaj kaj vidindaj estas la granda marmorsalonego, la biblioteko kun 100.000 volumoj kaj la bildogalerio.

La konstruaj, bildaj kaj pejzaĝaj efikoj, la solenaj prelataj diservoj, la ĥor-festprezentadoj faris persistan impreson al la knabo. Krom la lernejaj fakoj li lernis kantadon, violonon, fortepian- kaj orgenludadojn. En 1840 Bruckner faris la ekzamenon por la ĉeflernejo en la antikva urbo Steyr, la aŭstria Rothenburg, kie oni ankaŭ starigis por li monumenton. Poste li frekventis instruistan kurson en Linz kaj lia loĝdomo iama en Pfarrgasse 12 portas memortabulon. Li ankaŭ studas harmoni- kaj muzik-teoriojn. Post mallonga instruista praktikado en

Linz, Franz Josefs-placo. *Fot. Otto Kaiser, Linz.*

Windhaag kaj Kronstorf li fariĝis instruisto en St. Florian, poste abateja orgenisto kaj studadas kaj ekzercadas sian tutan liberan tempon. Tiel kreiĝas aro da komponaĵoj, inter ili jam atentindaj kiel rekviemo, la 114. psalmo, „Missa solemnis en B". En Linz li frekventas la malsuperan reallernejon kiel ne-internulo kaj inteligente lernas la latinan lingvon. Ne alia komponisto faris pli da studvojaĝoj kaj ekzamenoj ol Bruckner.

Je la fino de l' jaro 1855 Bruckner fariĝis katedrala kaj urb- paroĥa orgenisto en Linz. Venas la periodo de lia unua maturiĝo. Dum kvin jaroj — kiom ofte lia tempo tion permesis — li veturis al Wien, por studi ĉe Sechter la sciencobranĉojn pri la stilformoj kaj faris sian konservatorian ekzamenon. La restado en Linz fariĝis multsignifa por li kaj li atingis kiel orgenisto la plej altan artistan perfektecon tiel, ke li povis honore sukcesi apud aliaj famuloj en orgenkoncertoj en Nancy, Paris kaj London. Sed li ankaŭ prezentiĝis al la publiko kiel simfoniisto kaj komponisto de laikaj kaj eklezaj verkoj. En Linz post prov- kaj studlaboro ĉe Otto Kitzler, kiu konatigis lin kun la partituroj de R. Wagner, li verkis la Unuan simfonion, Ave Mario, la mesojn en „d"- kaj „e"-minoro, la viroĥoron „Germanenzug" k. a., kiuj plejparte ankaŭ estis prezentataj sub lia direktado. Li funkciis kiel ĥorestro de la unua kantunuiĝo kaj komponis por ĝi kelkajn ĥorojn.

En 1868 Bruckner venis al Wien sekve de la klopodoj de kortega muzikestro Herbeck. En Linz pro troa strečado de liaj nervoj estiĝis en Bruckner duboj pri lia talento, sed la kredo je Dio lin kondukis al memfido. Malgraŭ malicaj kritikoj, denuncoj, malatento en Wien Bruckner kreis — sekvante spiritan devigon — verkon post verko. La kolosaj pentraĵoj de liaj pluaj ok simfonioj, la feliĉig-religia „f"-minor-meso, Te Deum — dediĉita al la bona Dio — dokumentas la periodon de lia suferado en Wien. Dum liaj lastaj vivojaroj fidelaj amikoj, komprenemaj mecenoj, inter ili imperiestro Franz Josef, kaj famaj direktistoj, kiuj sukcese prezentadis liajn verkojn, helpis plibeligi lian vivofinon.

Dum ĉiuj ferioj, antaŭ la altaj eklezaj festoj, Bruckner rifuĝis en sian amatan Oberösterreich, al Linz al sia amiko kaj sekvanto Waldeck, ankaŭ al Florian kaj en la paroĥejon al Steyr, kie li ĉiam trovis gastaman akcepton, aŭ al la antikva idilia Vöcklabruck, kie lia fratino estis edzinigita. Kaj kiel Bruckner restis fidela al sia hejmlando ĝis la morto — li petis pro sia entombigo en Florian laŭ sia testamento — tiel ankaŭ Brucknerlando rekompencis ĉi tiun fidelecon al sia plej fama filo ĝis hodiaŭ kaj lin neniam forgesos.

Je memoro al Bruckner belega festaranĝo okazos de 25.—27. julio, nome: en Linz en la Landa teatro festa akcepto flanke de landestro doktoro Heinrich Gleissner, en la malnova katedralo „d"-minor-meso de

La julia **numero** de „Aŭstria Esperantisto" estos eldonata en **5000** ekzempleroj kiel varbnumero por nia „28. Universala Kongreso de Esperanto Wien 1936". Tiu ĉi enhavos 25—30 belajn bildojn kaj la **tutan programon** de la „28. Universala Kongreso de Esperanto Wien 1936".
Kiu deziras certigi al si kelkajn numerojn por siaj amikoj eksterlandaj, bonvolu mendi ilin ĝis 20. de junio. Favorprezo por antaŭmendoj po 5 ekzempleroj nur S 1.50.

Anton Bruckner sub la direktado de katedrala muzikestro profesoro Müller kaj en la festhalego la Kvara kaj Naŭa simfonioj de Bruckner, prezentotaj de Wiener Philharmoniker sub direktado de Bruno Walter kaj fine en la marmorsalonego de la baroka abatejo St. Florian kordinstrumenta kvinteto de Bruckner, prezentota de pligrandigita Marecker-kvarteto de Wiener Philharmoniker.

Vere multnombre por ĉeesti la grandajn festarangojn en bela lando de Bruckner, en Oberösterreich.

Trad. Maria Fiedler

Grandaj sukcesoj en Aŭstrio.

1. **Esperanto en komercaj lernejoj:** La Ministerio por Instruado permesis la instruadon de E. en la komercaj lernejoj kiel „nedeviga" fako. Tio estas la unua koncerna sukceso, ĉar oni permesis la instruadon ankaŭ de aliaj fakoj, sed unua ĉe oni pensis pri dua fremdlingvo kaj Esperanto. Akt-nro 35528-II/7 de 11. dec. 1934.

2. **Esperanto ĉe la Viena Foiro.** Depost 1924 la Foiro ne plu eldonis E.-prospektojn, sed nun la direktoro barono Stetten konsentis la eldonadon de prospektoj kaj ankaŭ disponigos al ni Esperanto-standon en la Foiro en septembro, bonega ebleco propagandi por la aŭtunaj E.-kursoj

3. **La poŝto kaj Esp.** Ne nur kursoj pri E. okazis ĉe ĉiuj poŝtdirekcioj, sed nun ankaŭ la vere progresema generald rektoro Ritter von Steyskal konsentis aldoni de la klarigoj (ĝis nun en germana, angla kaj franca lingvoj) ankaŭ en E. en la granda fervojhoraro.

Krome en 1936 ankaŭ en la libro pri aŭtobuslinioj estos la klarigoj ankaŭ en Esp.

4. **Esp. kaj Komerca Ĉambro.** En la presota listo pri novaperajoj la la teksto krom la germana, angla, franca kaj itala lingvoj nun estos ankaŭ en Esp.-Baldaŭ aperos!

Vi vidas, la organizo laboras senbrue, sed kun despli da sukceso. Fidu al ĝi kaj kunhelpu per tuja aliĝo!

5. **Belegaj gvidfolioj** eldonataj flanke de Bundesministerium f. Handel u. Verkehr-Werbedienst.

Fremdenverkehrsstelle der Stadt Wien.

Werbedienst der Stadt Graz.

Werbedienst der Stadt Klagenfurt.

Fremdenverkehrsamt des Landes Oberösterreich.

AEA.

El la poemaro **„Kantoj kaj malĝojo"**
de Antonie Piffl-Hartberg.

Antonie Piffl (A. Hartberg, pseŭd.), sentema lirikistino, kiu ankaŭ verkis dramojn kaj unuaktajn teatrajoin, naskiĝis en Prag, sed vivas de 30 jaroj en Wien. Ŝi estas la bofratino de la mortinta kardinalo de Wien d-ro Friedrich Gustav Piffl. El ŝia multa verkado estu menciata „Amo kaj doloro", poezia volumo, el kiu ni publikigas eltrančajon.

Feliĉon, turmenton en tasoj el oro
Mi pesi intencis — jen sonĝolaboro —
Sed, kiom mi estis kun pen' disiganta,
Nur kunfandiĝis potenc' diamanta.
Kontraŭe la vivon! — Miregis mi, ĉar
Miloble superis malsama la par'!

Trad. d-ro Biehler-Graz.

„Mi vokas la junularon de l' mondo!"

Redaktoro: Gärtner, tradukita de Paul Bennemann.

Kiel la mondhelplingvo Esperanto, tiel la ideo de l'novtempaj Olimpiaj Ludoj estas destinita kaj kapabla, servi al ĉiuj popoloj de la mondo.

En 1894 la barono Pierre de Coubertin renovigis — en kongreso de la sportpopoloj de l' mondo, kunvokita por tiu celo al Sorbonne en Paris — la Olimpiajn Ludojn, kiuj dum unu kaj duona jarmiloj estis dormintaj. Por aranĝi la ludojn, oni konservis la klasikan interspacon de kvar jaroj. Sed dum la ludoj en la antikva tempo okazis ĉiam en la sama loko, nome en Olimpio, oni decidis en Paris, ke ili migru, tiel, ke ĉiuj nacioj de l' mondo povu gastigi ilin unu fojon aŭ kelkajn fojojn kaj povu esti entuziasmigitaj de ili.

Do la unuaj ludoj ja estis aranĝataj 1896 en Athen, por honori la landon, en kiu la ideo naskiĝis; sed jam la festo de l' dua olimpiado okazis en Paris 1900. Sekvis 1904 St. Louis (Usono), 1908 London kaj 1912 Stockholm. La ludoj de l' sesa olimpiado, por kiuj Berlin jam estis fininta la preparojn, ne okazis. Poste Eŭropo vidis la sepan, la okan kaj la naŭan olimpiadojn: 1920 en Antwerpen, 1924 en Paris kaj 1928 en Amsterdam; kaj nur en 1932 ree la amerika kontinento gastigis la konkursantojn pri la olimpia laŭro, nome en Los Angeles.

De post ilia reveko la Olimpiaj Ludoj ampleksas ne nur la sportojn, kiuj estas praktikataj neprofesie. De 1924 al la someraj ludoj estis aldonataj vintraj ludoj, kiuj okazis 1924 en Chamonix, 1928 en St. Moritz kaj 1932 en Lake Placid. De 1908 kun la sportaj konkursoj estis ligita artkonkurso sur kvin kampoj, kiu elmontras la tutmondan influon de l' sporta movado al pentrarto, skulptarto, arkitekturo, literaturo kaj muziko.

Kiel lokon de l' 11-a olimpiado la Internacia Olimpia Komitato destinis la urbon Berlin kaj aprobis Garmisch-Partenkirchen por aranĝo de la Kvaraj Olimpiaj Vintraj Ludoj. Do oni festos la 1.—16. de aŭgusto 1936 la 11-an olimpiadon en Berlin; la 6.—16. de februaro 1936 antaŭiras la Olimpiaj Vintraj Ludoj en Garmisch-Partenkirchen.

Laŭ la ĝisnunaj sinanoncoj la germana organiza komitato kalkulas je grandioza partopreno de la tuta mondo. La simbolo de la Berlin-aj ludoj, la sonorilo kun la surskribo: „Mi vokas la junularon de l' mondo!" sonante prologos la feston antaŭ la elita sportjunularo de 50 nacioj. Ankaŭ ties samlandanoj, eĉ la tuta sportema mondo ĉeestos, por ke la nekompareblaj konkursoj okazu antaŭ la okuloj de la entuziasmigitaj sportamantoj kaj por ke la teamoj, stimulataj per alvokoj de siaj amikoj kaj samlandanoj, atingu maksimumajn sukcesojn.

Germanujo per tuta forto kaj je sia propra honoro penadas, fari la feston kiel eble plej sukcesa kaj entuziasmiga. La preparoj estos tiom grandegaj kaj ampleksaj, ke neniu vizitinto iam forgesos siajn travivaĵojn. Ĉiuj fortoj de l' sporto, de l' artoj kaj de l' ŝtato estas mobilizitaj. La tuta germana popolo kore bonvenigos la vizitantojn de la 11-a olimpiado. Ili rakontos pri germana gastamo, kiam ili estos revenintaj hejmen.

Organizacia Komitato por la XI-a Olimpiado Berlin 1936 E. V. — Aprilo 1935. —

Pensetoj de simplulo.

„La estonto estos nia". Tian nomon optimistaj samideanoj donis al sia klubo. Estas neordinare longa nomo. Sed ĝi estas pruvo de penso, kiu estas laŭdinda. Sen demanda signo la anoj de la klubo deklaras, ke ili konkeros la estonton.

Ĉu la bona intenco efektiviĝos? Aŭ ĉu ankoraŭfoje la antikva esprimo: la vojo al la infero estas pavimita per bonaj intencoj pruviĝos? Ni rajtas demandi. La respondon donos la samideanoj. La rezulto kaj la venkoj dependas de la individuaj streĉoj, klopodoj kaj laboroj. Nenio falas de la ĉielo. Nia persona volo plus niaj agoj kreas la eblojn atingi la fincelon.

Neniu penso povas esti pli memklara ol tiu pri internacia lingvo. La tuta evoluo marŝas al unuiĝo, kvankam la homoj ne vidas tion. La homoj estas sklavoj sub la jugo de la pasinto. Iliaj vidpunktoj plejgrandskale

Atentu, ke **„Aŭstria Esperantisto"** estos **de januaro dum 8 monatoj** la **oficiala organo** de „28. Universala Kongreso de Esperanto Wien 1936", kiun la aliĝintoj ricevos senpage. Vi do nur pagos por 1936 trionon de la prezo por Aŭstria Esperantisto.

estas katenitaj al teorioj, kies fundamentoj estas kiel el seka argilo. Telefono, telegrafo, rapidtrajnoj, oceanŝipoj, flugmaŝinoj kaj radio parolas lingvon, kiun ĉiu sincerulo komprenas. Tiuj teknikaj iloj estas kiel vojmontriloj. Ili ĉiuj montras la vojon al komuna laboro. Ili evidentigas la bezonon de Esperanto.

Sed la oreloj ne aŭdas, la okuloj estas blindaj, la voloj estas malliberaj. Sed — la bonintencaj fortoj, la konstruantaj idealistoj aŭdas, vidas kaj volas. Kaj ili oferas kaj laboras. Ne estas perdita la estonteco.

La tero estas glaciiĝinta por maldiligentaj porkoj, diras sveda proverbo. Kaj en tiu frazo kuŝas vero, kiu diras pli multe ol dumhoraj predikoj. La pesimistoj, kiuj neniam lernas kompreni, ke la suno ekzistas, kvankam nubamasoj kovras la ĉielon, neniam povos aliigi la mondon kaj fari la kondiĉojn pli eltolereblaj. Ilia volo estas velkinta. Ilia kredo forflugis. Ili ne kapablas esperi kaj revi. La espero estas la bazo de la evoluo. Sen tiu bazo la laboroj estas vanaj. Ĉar ili estas sencelaj.

Ĉiuj homoj renkontas malfacilaĵojn, barojn, malsukcesojn. La vivo regalas nin ne nur per dolĉa vino sed tre ofte per amaraj trinkaĵoj, kiuj naŭzas nin kaj lamigas niajn fortojn. Sed ni estas devigataj engluti ankaŭ la malagrablajojn.

„La estonto estos nia", estas kiel batalsignalo. Estas devizo, kiu dum ĉiuj epokoj de la homara historio lumis sur la standardo de tiuj homoj, kiuj ne perdis la kuraĝon sed estis volantaj laboruloj.

Sur la flago de la sveda esperanta movado tiuj vortoj estas pentritaj. La plano de la estraro, pri kiu vi legis en nia gazeto, estas inspirita de tiu kredo, ke la svedaj esperantistoj estas voluloj, kiuj scias siajn devojn kaj emas konkeri la homojn. La morgaŭo ne estas io nepriskribebla, io mistika fantomajo. La estonto estas la frukto de niaj faroj.

Ĉiu sveda, kiun ni varbas, estas briko, kiun ni uzas por nia komuna konstruajo. Ni estas forĝistoj de nia propra feliĉo. Do ek al energia laboro en la forĝejo. Martelegoj kaj ambosoj atendas nin.

El „La Espero"-Stockholm.

Ankaŭ ni kore alvokas la aŭstriajn esp.-istojn: estu brikoj eu nia konstruajo. Do ek al energia laboro en nia aŭstria forĝejo „pro la bono de Esperanto"! AEA.

Nia bela Aŭstrio.

Esperantista renkonto la 8. de julio.

En Gmunden la samideanoj matene renkontiĝos ĉe la koncerto, veturos posttagmeze per ŝipo al bela Ebensee kun ĝiaj salfarejoj kaj kalkŝton-industrio. De Ebensee kabla ŝvebfervojo suprenigos nin al la monthotelo Feuerkogel. Obstine la feraj katenoj de la kablofervojo etendiĝas nur sur tri apogiloj trans la transpasejojn de Feuerkogel kaj dum 18 minutoj ni faros la 3 km longan veturadon, kiu restos por ni ĉiuj dumviva travivajo pri neniam imagita ĉarmo. De la supro ni ĝuos belegan perspektivon: Böhmerwald kaj Niedere Tauern, Dachstein kun Bischofsmütze kaj preskaŭ kapteblaj la montsuproj de Totengebirge.



Do venu, por ĝui en samideana societo la belecon de la regiono. Anoncu vin al s-ano Ulbrich, Pettenbach, O.-Oe.

Mi esperas renkonti multajn samideanojn. Steiner

Sekcio de Teknikaj Vortaroj.

D-ro Fr. Francke, Lindwurmstrasse 145/I, München 2 SW verkis manuskripton pri jura fakvortaro.

Inĝ. Deckers, Chacara do Sol, Catalao Estado de Goyaz, Brazilio, verkis manuskripton pri ŝakvortaro.

Tutomu Maeda, kemiisto en la Instituto por Fizikaj kaj Kemiaj Esploroj, Tokio, kompilis plenan liston de „Sciencaj verkoj publikigitaj en E de Japanoj" (ekskluzive de medicinaj verkoj) kaj publikigis ĝin kiel aldonon al „Revuo Orienta".

Enketo pri uzado de E en sciencaj ĵurnaloj.

Int. Scienca Asocio Esp. deziras pli multe interesigi scienculojn pri E kaj tial faras jenan enketon:

1. Kiuj sciencaj libroj, artikoloj, gazetoj kaj raportoj laŭ via scio aperis ĝis nun verkitaj en E aŭ nur kun E-resumo?
   a) Titolo de la verkajo, gazeto ktp.?
   b) Verkinto?
   c) En kiu gazeto aŭ ĉe kiu eldonisto ĝi aperis? Adreso de la redakcio aŭ eldonejo?
   ĉ) En kiu jaro la verkajo publikiĝis?
   d) Kiom da paĝoj ampleksas la E-teksto?
2. De kiuj gazetoj laŭ via scio la redakcio rifuzis enpresigi E-artikolon aŭ resumon?
   a) Kiu estas la nomo de la gazeto?
   b) Kiu estas la adreso de la redakcio?
   c) Kiu estas la dato de la rifuzo?
   ĉ) Kiu estas la nomo de la spertinta verkinto?

Skribu al G. F. Makkink, biologo, Haagweg 240, Haag, Nederl.

Sonoj kaj resonoj el la Esperanta Gazetaro.

Redaktas: D-ro Emil Pfeifer.

„Rerigardo kaj la estonteco.

Feliĉiga estas rerigardo al 1934, ĉar ĝi montras konstantan progreson de E sur la radia kampo, kie ĝi pli firme eniris stadion de la praktika apliko. Tio donas kuraĝon por la nuna jaro. Aparte de multaj kursoj, la *ĉiusemajnaj aŭstriaj elsendoj de salutinda nivelo*, la bonegaj monataj „horetoj" de Ĉeĥoslovakujo, la francaj turismaj paroladoj, brodkastoj el Polujo pri tiu lando kaj marŝalo Pilsudski, la uzo de E pro anoncoj okaze de gravaj estonaj muzikprogramoj, atestas ĝian praktikan uzon. Ili ne estis propagando por E, sed utiligo de ĝi por diskonigi internacie la ideojn kaj ecojn de la koncernaj landoj, kaj tiel ili plenumas veran funkcion de nia lingvo. Ni estu fieraj, ke senescepte la diversaj stacioj estas kon-

Wollen Sie sich über **Neuerscheinungen** auf dem Gebiete der Esperanto-Literatur unterrichten, dann besuchen Sie **ohne Kaufzwang** unsere Esperanto-Buchhandlung in der Burgpassage!

tentaj pri la intereso vekita. Ekzemple la pola poŝtministerio jus aparte esprimis sian kontentecon pri la respondo ricevita el la esp.-istaro: simile faris la ĉehaj stacioj, por citi nur du kazojn. Tiu favoro al E estas ŝuldata al la centoj da celkonsciaj esp.-istoj, kiuj atestis sian ricevon de programoj. Ni konstante daŭrigu subtenon al la s-anoj laborantaj ĉe la diversaj radiaj stacioj."

E. D. Durrant, Hon. Radiosekretario, „The British Esperantist", febr. 1935

Pirate tra la gazetaro.

Literatura mondo (febr.-marto). „. . . . ni vidas someron, inter zorgaj siaj manoj elkovi por ni plej fervoran fajron."

Ni pensas, ke ne estas oportune elkovi inter siaj manoj. La birdoj, kiuj estas eminentaj specialistoj de l' kovarto, ne havas manojn kaj uzas, por kovi, alian korpoparton.

„La Pirato"-Paris.

Kion Vi eble ankoraŭ ne scias:

Raportoj el la interes-kampoj: Naturscienco j kulturhistorio kaj tekniko

Redaktas: Franz Vasta

Eiffel-turo en Paris rezultigus en fandita stato nur metal-kubon de 10 m³.

La plej valoraj bestoj de zoologiaj ĝardenoj estas la rinoceroj, por kiuj oni pagas ĝis 40.000 aŭstriaj ŝilingoj. Leono havas mezan valoron de 1600 ŝ, dume oni taksas elefanton proksimume je 20.000 ŝ.

Sole en Eŭropo niam estis konstruitaj en la lastaj du jaroj (1932/33) 801 novaj kinejoj.

Latoj-enigmo.

Red. Karl Haager.

S	R	N	U	O	D	I	J
E	B	U	J	U	O	N	N
N	A	D	E	M	I	O	U
R	Ĉ	N	T	J	S	I	O
N	E	K	U	M	E	U	A
N	M	N	O	A	N	E	I
V	N	S	I	E	V	A	S
C	K	P	E	O	R	I	R
A	O	B	M	N	A	L	E

La latojn oni metu tiel unu apud la alia, ke laŭlinie legitaj la literoj nomu tre veran eldiron.

Solvo el n-ro 5:

Einstein, Danzig, Ifigento, Nürnberg, Barcelona, Usono, Rom, Grabowski, Hamleto, Edinburgh.

Aŭstria Esperanto-Asocio

Wien I Neue Burg, Heldenplatz

Haben Sie auch Ihre Pflicht getan und geantwortet?

Herbstkurse 1935/36.

Bis nun sind Kurse in 51 Orten mit 62 Kursen und in Wien mit 27 Kursen sichergestellt.

Wir wollen aber Kurse in 100 Orten Oesterreichs, jeder einzelne außerhalb Wiens soll sogleich mit einfacher Karte die Anfragen in Nr. 5 beantworten, damit wir die Vorarbeiten abschließen können.

Niemand versäume, diese seine Pflicht zu erfüllen AEA

Krems. Okaze de la 70. datreveno de la naskiĝtago de nia Honora Prezidanto konsistoria kons. P. Franz Mestan ni aranĝis gratulfeston kun poem- kaj kantprezentadoj, elkora alparolo de nia prez. kaj transdono de honordonaco.

Linz. Jam preskaŭ 2 jarojn ekzistas E-grupo en Collegium Petrinum. Spite al malhelpajoj ni tamen sukcesis kaj nun nombras 15 — En la kongregacia revuo „Unsere Fahne" aperis ĉijare artikolo „Was soll ein Sodale über Esperanto wissen?" de s-ano Flach kun E-konkurso, en kiu partoprenis 30 pers. el 5 landoj. Nun ni instigis la supraaŭstriajn kongregaciojn per speciala invito lerni E-on. — En „Oberösterr. Arbeiterzeitung" - Linz s-ano Daxberger redaktas E-kurson. (Ni gratulas.) AEA

Esperanto-Klub, Wien.

Ni kunvenos en la laktejo, Prater, 3. kafejo, je la 19 h la 6. junio kaj 10 julio, krome la 15. de junio antaŭ la 15 h ĉe la ĉefenirejo de Technisches Museum vid-al-vide de Schönbrunn!

Serlokurso de s-ro Schwarz en Supra-Aŭstrio finiĝis kun bona sukceso kaj alportis al nia movado novajn adeptojn!

Publike ni elparolas dankon al ĉiuj, kiuj helpis sukcesigi ĉi tiujn kursojn.

Pli detala raporto sekvos AEA

Dankon al ge-Kaiper en Gloggnitz, kiuj sendis salutojn el Jerusalem.

Morto: La 28. IV. mortis en Wien f-ino Stephanie Elisabeth Pirchan, ŝatata artpentristino, muzikistino kaj kantistino, esp.-istino de 1910, fratino de nia s-ano konsulanto Karl Siegf. Pirchan.

Ŝi ripozu en paco.

Somerrefreŝiĝejo por esperantistoj: Schwertberg ĉe rivereto Aist en O. Oe. (proksime de St. Valentin) en bela, arbarriĉa regiono invitas vin Esperantistoj atendas vin tie. Informojn kontraŭ reafranko ĉe Oberlehrer Fruhwirt en Schwertberg.

Korespondado

Mallongigoj: P=pkarto, l=letero, I=ilustrita, bf.=bildflanke, PM=poŝtmarko.

Nagykörös (Hungarujo), Kovacs Ferenc, Cifrakert u. 1, pk., pm., jurnal.

Uakajamasi (Japanujo), J. Ogasaŭara Tojoharara-ĉo.

Košice (Ĉeĥoslovakio), J. Fridrich, Jarná, 13, il. pk., let.

Ljubljana, glavni kolodvor (Jugoslavio), Volk Alois, fervojisto. Kor., pk., let.

Unsere Esperanto-Buchhandlung.

Seit langer Zeit hatte das Publikum keine Gelegenheit, Esperantobücher und Werbematerial in der Auslage zu sehen. Die Stockung in der Propaganda und der schwache Besuch von Kursen ist zum großen Teile diesem Umstande zuzuschreiben.

Um unsere große Herbstoffensive richtig einzuleiten, haben wir an stark frequentierter Stelle in der Burgpassage die

„Bücherstube in der Burg" Wien I. veranlaßt, eine **ständige** Ausstellung von Esperanto-Lehrmitteln und Literatur, insbesondere aller Neuerscheinungen in beiden gegenüberliegenden Auslagen **in der Burgpassage** zu unterhalten.

Freunde unserer Zeitung können daselbst für ihre Propaganda kostenlos mehrere Probenummern unserer Zeitung »Aŭstria Esperantisto« erhalten.

Wir empfehlen allen Gesinnungsfreunden die Dienste dieser unserer Esperanto-Buchhandlung in Anspruch zu nehmen.

Recenzejo

„Norvega Esperantista Ligo", Oslo.

„Gaja knabo" de B. Björnson. Tradukita el la norvega lingvo de Liv Sandberg kaj Dordi Johansen. Prezo: ĉ. 2.50 ŝil.

Kvankam tiu ĉi novelo ne apartenas al tiuj verkoj, sur kiuj sin bazas la internacia famo de Björnson, tamen la Norvega Esperantista Ligo, kiu eldonis la libron, rikoltos la dankon de ĉiu Esperantisto, kiu volas studadi la spiritan evoluon de Björnson ankaŭ en liaj malpli konataj verkoj. Kiu ŝatas neekscitan legaĵon, verkitan en la trankvile priskribanta kaj rakontanta maniero de Ad. Stifter; kiu scias, ke la plej gravaj ekkonoj pri la mondo kaj la homoj tute ne estas interligataj nur al ekstere brilaj kaj grandiozaj okazoj kaj cirkonstancoj, certe kun granda plezuro legos ĉi tiun simplan rakonton.

Li certe interesiĝos pri la gaja junulo Oeyvind, kiu ne malesperas pri sia estonteco kaj pri la sorto de sia amo al la riĉa Marit, sed energie kaj virece klopodas, per studado gajni respektatan pozicion, kiu ebligas al li sukcese aspiri pri la amata knabino.

Bedaŭrinde ankaŭ en tiu ĉi tradukajo ĝenas kelkaj erare aŭ neklare tradukitaj lokoj; mi mencias nur: „svatanto" estas homo, kiuj peras edziĝon, ne homo, kiu volas edziĝi; „ĝis" ne estas konjunkcio; „nerve" povas signifi „nervig", sed neniam „nervös"—„nervoze". Julius Holzleithner

Agrablaj horoj por junaj esperantistoj nomiĝas 8-paĝa malgrandforma eldonaĵo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esp. en Veendam, Nederlando (P. Korte, Schoolstr. 13), kiu nun aperos 6-foje jare kaj povas esti malmultekoste aĉetata po cent aŭ pli ekzempleroj.

„Aŭstria Esperantisto" estas la **oficiala organo** de la aŭstria Esperanto-movado kaj pro tio abonata de ĉiu esperantisto **aŭstria**, kiu **nur** deziras la progreson de Esperanto kaj la plifortigon de nia aŭstria movado.